# TESTO 14

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Tro multe da ␣ ␣ **l** ␣ malbonigas la manĝon.

**2.** Bojas hundo sen ␣ **un** ␣ eĉ kontraŭ la suno.

**3.** Riĉulo havas ␣ ␣ **rn** ␣ **j** ␣, malriĉulo dornojn.

**4.** Pasero ␣ **p** ␣ **rt** ␣ ne bezonas averton.

**5.** Mi dankas al vi, **f** ␣ **d** ␣ **l** ␣ ␣ miaj soldatoj – respondis la sinjoro.

**6.** En Eŭropo homoj ofte ne plu scias, kion manĝi, se ili ne estas vegetaranoj, ĉar en la **v** ␣ **a** ␣ **d** ␣ de preskaŭ ĉiuj brutoj embuskas malsanoriskoj.

**7.** La filo rampis sub la liton kaj eltiris de tie ␣ ␣ **r** ␣ ␣ da novaj ŝuoj.

**8.** Pluraj alpistoj mortis tie pro la sovaĝaj patagoniaj ventegoj, glaĉeraj fendoj kaj **s** ␣ **b** ␣ **t** ␣ ␣ veterŝanĝiĝoj.

**9.** Nu, kion fari! Tia estas la ␣ **o** ␣ **t** ␣ de ĉiuj veraj talentoj en la nuna nekultura epoko!

**10.** Ned vidis unuafoje, ke ambaŭ liaj ␣ **r** ␣ **r** ␣ ␣ estas kovritaj de blankaj, kirurgaj ŝtrumpoj por egale subteni la sangopremon, pro la vundo en la maldekstra.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Apude staras publika **t** ␣ **l** ␣ **f** ␣ ␣ ␣ sub grandega ruĝa ŝtalkloŝo, kiu ŝirmas la telefonantojn de pluvo, neĝo kaj sunbrilo.

**2.** Pluraj politikistoj anstataŭ **h** ␣ **n** ␣ **s** ␣ ␣ labori por la lando, donas, tro ofte, la impreson pli volonte zorgi pri siaj multaj avantaĝoj de la mondonaj ŝtatfunkcioj.

**3.** Ĉi-jare mi decidis resti hejme kaj inviti la **p** ␣ **r** ␣ ␣ **c** ␣ ␣ ␣ pasigi kune la Kristnaskon.

**4.** En la sama momento estingiĝis **o**␣ **c** ␣ **d** ␣ **n** ␣ **t** ␣ la lasta radio de la plej bela tago sur la tero.

**5.** Kelkaj lastatempe publikigitaj dokumentoj tamen indikas, ke la **s** ␣ ␣ **r** ␣ **t** ␣ servo estis informita pri la komploto kontraŭ Ben Barka.

**6.** Mario jam tute perdis esperon, ĉar la malsano estis terura, daŭris jam kelke da jaroj kaj senhalte **p** ␣ ␣ **g** ␣ ␣ **s** ␣ ␣.

**7.** En la multaj artikoloj kaj recenzoj Waringhien **p** ␣ **l** ␣ **r** ␣ ␣ sian doktan stilon, ĝis li fariĝis senrivala dum ankoraŭ multaj jaroj.

**8.** En dekstra supra angulo de la paperfolio estis kvar centimetrojn larĝa, dika ŝoke ruĝa stelo **d ␣ s ␣ g ␣ ␣ t ␣** per tre dikpinta feltskribilo.

**9.** Mi komencis aĉeti belajn arbojn kaj **p ␣ a ␣ t ␣ ␣** ilin en la herbaro.

**10.** Dume, nia gvidanto **i ␣ f ␣ r ␣ ␣ ␣** nin pri esperantaj eventoj rilatantaj al la vizitataj lokoj kaj la politika situacio.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| strang', tegment', apog', skrap', organiz', pentr', karb', sav', ĝeneral', streĉ'. |
|---|

**1.** La Viena programo estas **␣ ␣v␣ t ␣** parte pere de financa subteno de geaŭskultantoj, parte per antaŭvidataj varbdisaŭdigoj.

**2.** Jam ekzistas okulvitroj por skiantoj, sur kiuj etaj **␣ ␣ r ␣ ␣ ␣ ĵ ␣ ␣** ripariĝas sub influo de suna varmo.

**3.** Jen **␣ t ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ l ␣**: veste li aspektis ege malriĉe, sed poze, ire kaj aŭte li impresis iel eleganta.

**4.** La du malsanulejoj de la fondaĵo estas gravaj **␣ p ␣ ␣ ␣ l ␣ ␣** de la medicina prizorgado en la regiono.

**5.** Inter la kaptitoj **␣ ␣ ␣ ␣ ĉ ␣ ĝ ␣ ␣** la rilatoj, ĉar evidentas, ke la homa transviv-instinkto pretas oferi aliulojn por savi la propran haŭton.

**6.** Por ekspozicio estas bonvenigataj **␣ ␣ ␣ ␣ r ␣ ĵ ␣ ␣** kaj aliaj manfaritaj objektoj.

**7.** La nuklea energio (en armiloj kaj el pacaj atomelektrejoj egale) estas kritikata akre kaj **␣ ␣ ␣ ␣ r ␣ ␣ ␣ g ␣** pro granda minaco al la sano kaj vivo de homoj kaj vivmedio.

**8.** Ordinaraj ŝtormoj en Eŭropo nun fariĝas veraj tempestoj kun terura detruforto, ili faligas kompletajn arbarojn kaj ankaŭ **s ␣ ␣ t ␣ ␣ ␣ ␣ n ␣ ␣ ␣ ␣ ␣** domojn.

**9.** Aŭskultu, la **␣ ␣ ␣ b ␣ ␣ t ␣** kantas la malnovajn melodiojn, laŭ kiuj ni en nia infaneco tiel ofte dancadis.

**10.** En la ĉefurbo Dublino **␣ ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ z ␣ ĝ ␣ ␣** publikaj protestoj kaj manifestacioj, sub la slogano “Neniu naftomilito en Irako!”.

## **Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** En pluraj urboj, oni konstante vidas, precipe dumnokte, longajn ___ de homoj vane atendantaj taksiojn.

**a.** vicojn **b.** notojn **c.** ondojn **d.** tabulojn

**2.** Apliko de gentekniko celas provizi ___ per rezisto kontraŭ virusaj malsanoj.

**a.** kornojn **b.** parencojn **c.** ŝuojn **d.** plantojn

**3.** Jen la sklavinoj stariĝis sur la ___ de la fingroj piedaj kaj ekflugetis sur la planko, dancante kiel ankoraŭ neniu dancis.

**a.** bekoj **b.** haŭtoj **c.** pintoj **d.** fromaĝoj

**4.** Li estis ĉirkaŭata de l' ___ de sia pipo, kiuj dancis laŭ la mallaŭta klasika etosmuziko.

**a.** fumoj **b.** gasoj **c.** literoj **d.** muŝoj

**5.** Korupteco triumfis ankaŭ en postmiteranda Francio, tamen tie ministroj nur perdas siajn ___ fotelojn kaj ne, kiel en Ĉinio, siajn kom-partiajn kapojn.

**a.** volontajn **b.** paciencajn **c.** komfortajn **d.** konstantajn

**6.** Emil dum tagoj vagis en dezerto kaj kiam trovis akvon en friska oazo, li ne povis estingi sian ___.

**a.** soifon **b.** vundon **c.** lampon **d.** fumon

**7.** Tian reagon Davido ne estis atendinta; unu el la ___ paŝis iom antaŭen, militparade turnis sin kaj kiel meĥanika roboto malfermis la pordon.

**a.** kondiĉoj **b.** ŝtrumpoj **c.** soldatoj **d.** pontoj

**8.** Fine de junio kelkmil tirolanoj baris dum 30 horoj la ŝoseon, tamen ŝoforoj, antaŭe ___, ne suferis pro gravaj ŝtopiĝoj.

**a.** avertitaj **b.** paciencaj **c.** strangaj **d.** surdaj

**9.** Kiel redaktoro, mi devas ___, ke mi ĉiutage plurfoje uzas *PIV*on, *Esperantan Bildvortaron* de Eichholz kaj la vortarojn de Bokarev.

**a.** venki **b.** plugi **c.** imagi **d.** konfesi

**10.** Cetere, al Tel Avivo venis neniu kongresano el la najbara araba landaro, kvankam UEA efektivigis ___ varban kampanjon en la arabaj landoj, precipe en Jordanio.

**a.** fidelan **b.** plata **c.** specialan **d.** spertan